# Regularo por ORIGO-sistemaj Esperanto-ekzamenoj

de la Ŝtata Ekzamena Centro pri fremdaj lingvoj
ĉe la Budapeŝta Supera Fremdlingva Trejnejo („ITK”)
de la Budapeŝta Universitato Rolando Eötvös („ELTE”)[1]

**1. § Ĝeneralaj instrukcioj**

La regularo validas pri efektivigado kaj efektivigantoj de unulingvaj Esperanto-ekzamenoj laŭ la sistemo ORIGO, fondita de la Ŝtata Ekzamena Centro kaj funkciigata de la sama Ŝtata Ekzamena Centro, kunaganta kun Universala Esperanto-Asocio (UEA).

**2. § Tipoj, niveloj de la lingvo-ekzamenoj**

Laŭ la speco de la lingvo-ekzameno:
ĝenerala unulingva tipo, ne testanta kapablon je perado.

Laŭ la tipo de la lingvoekzameno:
parola, por testi parol-komprenon kaj parol-produkton,
skriba, por testi kapablon kompreni legatan tekston kaj kapablon skribe esprimi sin,
kompleta, kiu ampleksas kunan mezuradon de kapabloj je parolo kaj skribo.

La niveloj de la lingvoekzameno:
B1 (baza nivelo, „salto” laŭ la Eŭropa Referenckadro)
B2 (meza nivelo, „flugo” laŭ la Eŭropa Referenckadro)
C1 (supera nicelo, „aŭtonomeco” laŭ la Eŭropa Referenckadro)

**3. § La postuloj de la lingvo-ekzameno**

A) Ekzameno je nivelo B1 (baza)

Ĉe ekzameno pri lingvokon-nivelo B1 oni devas mezuri kaj prikonstati konon necesan por simpla komunikado en la fremdalingvo. La ekzameno celas esplori lingvajn kapablojn kaj kompetentojn jenajn:

[1] La hungarlingva nomo de la instituto estas: *Idegennyelvi Továbbképző Központ.* Ĝi estas landa metodika centro kaj centra fremdlingva ekzamenejo, laŭesence kaj resume: *centra trejnejo fremdlingva*. En *Esperanto de nivelo al nivelo* oni trovas alternativan nomtradukon: *Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj de la Universitato Eötvös Loránd.* Tiu nomo paŭsas la hungarlingvan tradician vortumon kaj emfazas la apartenon al la universitato krome esprimas la fakton, ke la instituto trejnas interalie gestudentojn de la renoma universitato. La latina nomo de la universitato estas *Scieantiarium Universitas Budapestiensis de Rolando Eötvös nominata*: la nomformo *Rolando* (forme identa je la Esperanta nomo *Rolando*), aperas ankaŭ en Esperantaj prezentoj de la universitato. Samtempe kun maloftiĝo/likvidado lastatempa de Esperantaj nomoj ankaŭ la nomo latintradicia malaperas en pli novaj Esperantaj tekstoj, post pli frua alterna uzado de nomoj. La Universitato estis fondita en la jaro 1635. La lingvo de la instruado longe estis Latino, kaj ĝi restas uzata en parto de la dokumentoj, diplomoj ankaŭ nuntempe.– Ni intencas informi kaj pri la kutimaj nomoj, kaj pri la esenca karakterizo de la priparolataj institucioj.

- kapablon kompreni malrapidan, klaran, komunlingvan parolon pri bone konataj temoj(ekz. familio, hejmo, libera tempo, labor(ej)o ktp.). Ĉe tio miskomprenetoj okazas ankoraŭ ofte, ritmoŝanĝoj la lingvouzanton iam eventuale ĝenas, konfuzetas;

- kapablon reagi je aliula parolo, sen perdi la temfadenon. La lingvouzanto kapablas esprimi elementajn bezonojn, parolas tamen iam malprecize, kun nemalmultaj paŭzoj;

- li/ŝi kapablas kompreni simplan skriban tekston, dank'al proporcia posedo de pasiva vort-trezoro, krom de tiu aktiva; kaj dank'al kono de bazaj strukturoj de la cellingvo;

- li/ŝi kapablas formuli kaj skribe fiksi simplajn tekstojn pri temoj proksimaj, konataj por li;

- konas la rudimentajn, ĉiutagajn kulturajn konvenciojn, kliŝojn, kutimojn de komunikado en la cellingva komunumo.

B) Postuloj ĉe ekzameno de meza nivelo (B2)

Ĉe ekzameno de meza nivelo (B2) oni testas fremdlingvo-konon necesan por komunikado en la fremda lingvo en cirkonstancoj de la ĉiutaga vivo.

La ekzameno ampleksas la sekvajn kapablojn kaj kompetentojn:

- la ekzamenato komprenas esencon, karakteron de la diraĵo, malgraŭ eventuala nekompreno de malgravaj detaloj;

- li/ŝi kapablas eniri naturan komunikadon kun fremdlingva/alilingva partnero, sen penserĉadi vortojn, kvankam li evitas supermeze abstraktan leksikan nivelon kaj parolas plejparte sen idiotismoj;

- komprenas iom kompleksajn kaj abstraktajn tekstojn sen gravaj miskomprenoj;

- kapablas krei klaran kaj detal-riĉan tekston, esprimi sian opinion, argumenti simple, priparoli analize oftajn ĝeneralajn temojn, malgraŭ eventualaj stileraroj aŭ ioma malkontinueco;

- konas la rudimentajn ĉiutagajn kulturajn konvenciojn, kutimojn de la cellingva komunumo.

C) Postuloj ĉe ekzameno pri supera lingvokon-nivelo (C1)

Ĉe ekzameno de nivelo supera (C1) oni prikonstatas fremdlingvo-konon, kiu ebligu ĉiuteman, aplomban uzon de la tuta rimedaro de la lingvo.

La ekzameno ampleksas la sekvajn kapablojn kaj kompetentojn:

- tutece kaj pridetale kompreni stile poluritajn, variajn kaj longajn parolajn komunikaĵojn kun eventualaj kaŝe aludaj aŭ malsimple metaforaj senc-elementoj;

- la ekzamenato parolas flue, kun klaraj artikulacio kaj parol-ritmo, sen ĝenaj akĉento, misakcentoj, kun konvenaj emfazoj, kaj plejparte konvena intonacio; uzas, je natura; ritmo, karakterizajn kompleksjan sturkturojn, parol-turnojn; flue konversacias, eĉ se ne faknivele, pri relative altgrade abstraktaj temoj;

– li/ŝi komprenas, teksto-nivele, kun certeco, komunikaĵojn je variaj temoj kaj stiloj; rekonas la esencajn stilo-trajtojn;

– li/ŝi kapablas krei, lerno-cele, praktike seneraran, klaran tekston, konforman al la spirito de la cellingvo;

– li/ŝi konas la normlingvon, rekonas nenormajn lingvo-versiojn;
kapablas, dank'al sia rutina kono observi la kulturajn konvenciojn, kutimojn de la cellingva medio.

**4. § Daŭro de la ekzamenoj**

Skribaj ekzamenoj:

Nivelo baza (B1): 2 horoj
Nivelo meza (B2): 3 horoj
Nivelo supera (C1): 4 horoj

Parolaj ekzamenoj:

Daŭro de parola ekzameno unu- aŭ dulingva, antaŭ komisiono:

B1 (ĉe baza nivelo): ĉ. 10 minutoj
B2 (ĉe meza nivelo): ĉ. 15 minutoj
C1 (ĉe supera nivelo): ĉ. 20 minutoj

Aŭda kompreno de sonregistraĵo

B1 (je nivelo baza): ĉ.30 minutoj
B2 (nivelo meza): ĉ. 30 minutoj
C1 (nivelo supera): ĉ. 30 minutoj

**5. § Kvalifikado de la lingva ekzamen-plenumo**

Por kvalifiki la plenumon de la ekzamenato, oni ĝin pripoentas. La ekzameno estas sukcesa, se la ekzamenato atingas 40%-ojn de la atingebla poento-nombro, kaj entute plenumas 60%-ojn de la sume atingeblaj poentoj.

Ĉe parola ekzameno oni povas akiri la subajn nombrojn da poentoj:
B1 (baza nivelo): 50 poentoj (sukceso-zono: ekde 30 poentoj)
B2 (meza nivelo): 60 poentoj (sukceso: ekde 36 poentoj)
C1 (supera grado): 80 poentoj (sukceso: ekde 48 poentoj)

Ĉe skriba ekzameno oni povas akiri la subajn nombrojn da poentoj:
B1 (baza nivelo): 60 poentoj (sukceso: ekde 36 poentoj)
B2 (meza nivelo): 70 poentoj (sukceso: ekde 42 poentoj)
C1 (supera nivelo): 90 poentoj (sukceso: ekde 54 poentoj)

Ĉe **ekzameno B1** la **minimumaj** priplenumaj **poento-nombroj** por trapasi ekzamenon, por ĉiu respektiva kapablo estas:

Parola ekzamen-parto

Parol-kapablo

| | | |
|---|---|---|
| Komunika valoro: | maksimume 15 poentoj | minimuma plenumo: 16 poentoj |
| Vortotrezoro: | maksimume 15 poentoj | |
| Lingva ĝusteco: | maksimume 10 poentoj | |

Parol-kompreno (de registrita voĉo):

| | | |
|---|---|---|
| | maksimume 20 poentoj | minumuma plenumo: 8 poentoj |

Skriba ekzamen-parto

| | | |
|---|---|---|
| Lingvo-kono: | maksimume 10 poentoj | sen postulo pri minimumo |
| Skribo-kapablo: | maksimume 20 poentoj | minumima plenumo: 8 poentoj |
| Lego-kapablo: | maksimume 20 poentoj | minimuma plenumo: 8 poentoj |

Ĉe **ekzameno B2** la **minimumaj** priplenumaj **poento-nombroj** por trapasi ekzamenon, por ĉiu respektiva kapablo estas:

Parola ekzamen-parto

Parol-kapablo

| | | |
|---|---|---|
| Komunika valoro: | maksimume 15 poentoj | minimuma plenumo: 18 poentoj |
| Vortotrezoro: | maksimume 15 poentoj | |
| Lingva ĝusteco: | maksimume 15 poentoj | |

Parol-kompreno (de registrita voĉo):

| | | |
|---|---|---|
| | maksimume 25 poentoj | minimuma plenumo: 10 poentoj |

Skriba ekzamenparto

| | | |
|---|---|---|
| Lingvo-kono: | maksimume 20 poentoj | sen difino de minimumo |
| Skribo-kapablo: | maksimume 20 poentoj | minimuma plenumo: 8 poentoj |
| Lego-kapablo: | maksimume 20 poentoj | minimuma plenumo: 8 poentoj |

Ĉe **ekzameno C**1 la **minimumaj poento-nombroj** por trapasi ekzamenon, por ĉiu respektiva kapablo estas:

Parola ekzamen-parto

Parol-kapablo

| | | |
|---|---|---|
| Komunika valoro : | maksimume 20 poentoj | minimuma plenumo: 24 poentoj |
| Vortotrezoro: | maksimume 20 poentoj | |
| Lingva ĝusteco | maksimume 20 poentoj | |

Aŭda kompreno de sonregistraĵo:

| | | |
|---|---|---|
| | maksimume 30 poentoj | minimuma plenumo: 12 poentoj |

Skriba ekzamen-parto

| | | |
|---|---|---|
| Lingvo-kono: | maksimume 20 poentoj | sen difino de minimumo |
| Skribo-kapablo: | maksimume 40 poentoj | minimuma plenumo: 16 poentoj |
| Lego-kapablo: | maksimume 20 poentoj | minimuma plenumo: 8 poentoj |

**6. § Ekzamen-kotizo**

Oni pagas por la ekzameno je konto de UEA. La ekzamena kotizo laŭ tipoj kaj niveloj. Estas konstatata de la Budapeŝta Ŝtata Ekzamena Centro, je konsento kun UEA.

UEA rajtas havigi rabaton al ekzamenatoj.

Persono ne aperinta ĉe anoncita ekzameno rajtas repostuli, maksimume, 40%-ojn de la ekzamenkotizo, ĝis ne pli ol 40 tagoj post la laŭanonca ekzameno-tago.

Egalvaloro de ekzamena kotizo minus administraj kostoj – estas rehavigebla al persono petinta rehavigi la ekzamenan kotizon antaŭ la limdato aliĝi.

Prokraston de la ekzameno oni povas peti unufoje. Eĉ tiaokaze, la ekzameno devas esti plenumata ene de unu jaro. Partoj de la parola ekzameno ne estas tempe apartigeblaj, oni povas pripeti nur prokraston de la tuto de la parola ekzameno. Se temas pri kompleta ekzameno, ĝiaj parola kaj skriba partoj povas esti prokrastataj aparte.

### 7. § Kondiĉoj de aliĝo kaj de allaso al ekzameno

Ĉiu persono plenuminta sian 14an jaron povas anonci sin por ekzameno.
Sin-anoncinto povas trapasi ekzamenon en lokoj kaj tempoj anoncitaj de UEA.

Oni aliĝu al ekzameno je difinitaj tipo, nivelo, kaj je anoncita tempopunkto. Por ĉiu lingvo, tipo kaj nivelo oni direktu apartan aliĝilon. Pri la ekzameno-tempoj nformas UEA kaj la Budapeŝta *Ŝtata Ekzamena Centro.*

Por aliĝi al lingvoekzameno oni plenskribu aliĝilon encirkuligatan de la Ŝtata Ekzamena Centro kaj kotizu por la ekzameno. Aliĝilo estas akirebla ĉe la administrejo de UEA. Ekzamena aliĝilo estas deŝutebla ankaŭ de Interreto. La kotizo estas transpagebla al konto de UEA.

Se por anoncita ekzamena tempopunkto kaj anoncita loko ne aliĝas minimume 7 personoj, la Ekzamena Centro havas la rajton ne okazigi ekzamenojn; informinte la kandidaton, oni povas lin direkti al alia ekzamena periodo aŭ alia ekzamenejo.

Aliĝintojn, kiuj neplene aŭ erare plenskribis la formularon, aŭ ne kunsendis kvitancon pri pagita kotizo, UEA avertas ripari la mankojn. Se la limdato estas preterpasita, atestoj ne plu estas konsiderataj.

Ripete mankohave plenskribita, nekompleta aliĝilo (sen pagatesto) ne rajtigas okazigi ekzamenon de la kandidato, la ekzamena kotizo ne estas repagebla.

### 8. § Invito al ekzameno

UEA sciigas al la kandidatoj la tempon kaj la lokon de la skribaj kaj parolaj ekzamenoj minimume dek tagojn antaŭ la komenco de la ekzameno, kaj informas ilin samtempe pri iliaj rajtoj kaj devoj.

Ĉiu kandidato devas esti informata pri

- la tipo, nivelo, loko kaj tempo de la ekzameno
- pri la necesaj dokumentoj kaj manieroj de ilia prezentado
- pri helprimedoj necesaj kaj permesataj ĉe la ekzameno;
- pri rajto vidi la ekzamenan regularon
- pri devo korekti rimarkitajn erarojn de la personaj indikoj

### 9. § La skriba ekzameno

Pri organizado de la skriba ekzameno, preparo kaj sekretigo de la ekzamenaj temojrespondecas la direktoro de la Ŝtata Ekzamena Centro kaj la personoj komisiitaj de tiu.

Skribaj ekzamenoj ene de certa ekzamena periodo komenciĝas je la sama tempo en ĉiu ekzamenloko.

La skriba ekzameno devas esti organizata tiamaniere, ke la sekreteco de la temoj ĝis la komenco de la skriba ekzameno, la sekreteco de la skribaj taskoj kaj de la korektantoj ĝisfine restu garantiata.

**10. § La parola ekzameno**

Ĉiuj tri niveloj de la parolaj ekzamenoj konsistas el po tri partoj, kiel sube:

1. Direktata konversacio, memstara ekspliko de temo surbaze de stimulo per bildo, situacia dialogo, krome ĉe supera nivelo: el interpreto de informkaraktera teksto (gazeta informo).
2. Mezurado de kompreno de aŭdata (registrita) teksto surbaze de taskofolio.

A) Ekzameno antaŭ komisiono

La kanditatoj estas ekzamenataj de komisiono delegita de la ŝtata Ekzamena Centro. La ekzamenkomisionoj konsistas el po du membroj. Ĉiu lingva plenumo de la kandidato estas kvalifikata de du kvalifikantoj.

Ne povas ekzameni la kandidaton persono, kiu estas kun li en parenca, dependa, negoca rilato, aŭ kiu la kandidaton al la ekzameno preparis, en kurso aŭ individue. Ekzamenanto, kiu havas iun ajn el la supraj neakordigeblaj rilatoj, devas tion raporti al la estro de la ekzamenejo.

Ankaŭ la kandidato rajtas prezenti obĵeton pri tuto aŭ parto de la komisiono antaŭ la komenco de la ekzameno. La obĵeton ekkonitan oni devas raporti al la direktoro aŭ al la gvidanto de la ekzamenejo.

Por likvidi la neakordigeblon aŭ interesatecon procedas la direktoro aŭ la gvidanto de la ekzamenejo.

La Ŝtata Ekzamena Centro kaj la ekzamenejoj, post la fino de la tiutagaj buŝaj ekzamenoj, informas pri la poentoj akiritaj ĉe la parolaj ekzamenoj.

Iu ajn komisiono rajtas unuokaze ekzameni maksimume 20 kandidatojn je baza nivelo, 16 personojn je meza nivelo, kaj 12 personojn je nivelo supera.

Parola ekzameno – se la kondidato estas espriminta sian konsenton – povas esti sonregistrata kaj aŭ videoregistrata.

B) Kompren-ekzameno je registrita voĉo

Tasko por testi aŭdan komprenon (de nun: la laboratoria ekzameno) estas parto de la parola ekzameno; ĝi konsistas en solvado de taskofolio post dufoja (ĉe supera nivelo) aŭ trifoja (ĉe meza nivelo) aŭskultado de normal-ritma teksto, redaktita, sed prenita el cellingva fonto.

La registraĵo devas enhavi centre registritajn instrukciojn pri la procezo de la ekzameno. Komencita disaŭdigado devas esti kontinua, oni ne rajtas ĝin interrompi, malfruantoj ne rajtas postkomence eniri la ĉambron. Malfruintoj devas pripeti novan ekzamen-tempon.

**11. § Anonco de la ekzamen-rezultoj, dissendo de atestiloj**

La ekzamenitojn oni devas informi pri la ekzamenrezulto ĝis ne pli ol 30 tagoj post la ekzamentempo.

La Ŝtata Ekzamena Centro havigas al la ekzamenitoj ekzamen-dokumentojn kontinue sed plej malfrue ene de 60 tagoj post la ekzameno.

Atestilo pri aparta parol-tipa ekzameno kun atestilo pri skribotipa ekzameno egalvaloras je atestilo pri kompleta ekzameno, sendepende de la tempintervalo kaj lokoj de la ekzamenado.

## 12. § Rajtoj, juraj rekompencoj de la ekzamenatoj

Ĉiu ekzamenejo de la Ŝtata Ekzamena Centro kaj de UEA devas ebligi kontentigon de la ekzamenatoj kun specialaj bezonoj, precipe

– ebligi senmalhelpan atingon de la ekzamenejo
– ebligi uzon de specialaj rimedoj.

Oni povas, ene de 15 tagoj post la anonco de la ekzamenrezultoj, pripeti kontrolon de la ekzamenrezultoj koncerne kvalifikadon, malobservon de juraj reguloj aŭ kalkulerarojn.

La direktoro de la ŝtata Ekzamena Centro la kontrolpeton ekzamenas, kaj se li/ŝi konsentas pri la enhavo, li/ŝi modifas la decidon de la ekzamena centro.

La direktoro de la Ŝtata Ekzamena Centro decidas pri la kontrolpeto ene de 15 tagoj post ĝia prezento, kaj li inforas pri sia decido la ekzameniton.

## 13. § Speciala procedo

Se oni prezentas oficialan petskribon pri perdita atestilo, la Ŝtata Ekzamena Centro senpage liveras duoblaĵon.

## 14. § Ceteraj kaj fermaj instrukcioj

La regularo de la Ŝtata Ekzamena Centro estas rigardebla en la centra konstruaĵo de la Budapeŝta Ŝtata Ekzamena Centro, ĉe la Budapeŝta Supera Fremdlingva Trejnejo („ITK") kaj en la ekzamenejoj de UEA, krome sur ties respektivaj retpaĝoj.

Koncerne traktadon de la personaj indikoj de la ekzamenatoj estas observendaj la ordonoj de la leĝo n-ro 63 (LXIII), de la jaro 1992.

Pri valideco de la indikoj sur la aliĝilo respondecas la ekzamenato.

Ekzamenato, kies uzo de nepermesataj rimedoj estas rimarkita aŭ kies trompo alimaniere estas konstatebla, devas esti ekskludata kun neniigo de la jamajpartaj rezultoj, precipe se

– la kvalifikantoj de la laboraĵo, aŭ de la taskofolioj pri kompreno de aŭdita teksto, konstatas, ke la solvoj parte aŭ tute koincidas, pruveble, kun solvoj de alia ekzamenato
– la lokaj kontrolantoj rimarkis ĉeage uzon de preparitaj kliŝoj, modeloj, interparoladon kun alia ekzamenato, uzadon de poŝtelefono
– la ekzamenantoj aŭ la lokaj kontrolantoj ne sukcesas sendube konstati la person-identecon de la ekzamenato, aŭ se estas pruvite, ke aperis ne la aliĝinta persono por esti ekzamenata

Jenan regularon la konsilio de la Ŝtata Ekzamena Centro dum sia kunsido la 2an de decembro 2008 akceptis, la enhavatajn ordonojn oni devas apliki ekde 01. 01. 2009.

La 2an de Decembro 2008a

Katalin GÁBORJÁN
/Direktoro/